

BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO

EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA

novembro 1978

S e s d e k j a r o j d e Ĉ e ĥ o s l o v a k i o

Inter la jubileoj, kiujn ni ĉi-jare solenas, unu el la plej gravaj kaj elstaraj estas la 60-a datreveno de estiĝo de la Ĉeĥoslovaka respubliko. La ekesto de memstara kaj sendependa Ĉeĥoslovakio la 28-an de oktobro 1918 apartenas al la plej gravaj momentoj de nia moderna historio, ĉar post jarcentoj de neegalrajta kaj subordigita pozicio dum habsburfea regno nia popolo reakiris la nacian sendependecon kaj liberecon. Kvankam la revolucia aktiveco de la popolamasoj estis inspirita de la Granda oktobra socialisma revolucio, la regpovon en la nova ŝtato uzurpis la burĝaro kaj la nova ŝtato fariĝis burĝa demokratio. Tial ne plenumiĝis la revoj kaj postuloj de la laboranta popolo pri la socialaj libereco kaj justeco kaj la laborantaj amasoj estis devigataj lukti plu por siaj plenaj socia kaj klasa liberigo.

Sed malgraŭ la mankoj kaj limigoj la nova ŝtato fariĝis mejlo-ŝtono en la strebadoj de multaj generacioj. Post la 300-jara jugo la ĉeĥa nacio akiris sian ŝtaton kaj nacian liberecon; la slovaka nacio akiris spacon por sia nacia disvolviĝo. La ĉeĥa kaj slovaka lingvoj fariĝis lingvoj ŝtataj, uzataj en la ŝtata administracio, en multaj regionoj estis komencita lerneja instruado en tiuj ĉi lingvoj, pli rapide disvolviĝis la nacia literaturo.

La kreiĝo de Ĉeĥoslovakio estis tre grava historia progreso, eĉ se la ŝtato havis burĝan karakteron. Pro sia klaskaraktero tamen la ĉs. ŝtato povis certigi nek socialan liberigon de la laboranta popolo, nek solvi la fundamentajn problemojn de ekzistado de la ĉeĥa kaj slovaka nacioj. Tio respeguliĝis en la jaro 1938, kiam pro komploto de imperiismaj ŝtatpotencoj Ĉeĥoslovakio estis ĵetita inter la ungojn de Hitler kaj sekve de tio neniigita kaj likvidita. Nur post la liberigo fare de la heroa Soveta armeo, la nova Ĉeĥoslovakio sub gvido de la Komunista partio, suriris la novan vojon de nacia kaj sociala liberigo, plenuminte tiel la revojn kaj postulojn de la popolamasoj el la jaro 1918.

J. Patera

Ant. Slanina: L I N G V A S P E G U L O

Kondicionalo

En kondiĉaj frazoj oni uzas kondicionalon "-us":

Mi skribus, sed mi ne havas plumon.

Ŝi kantus, sed ŝi ne povas pro malsano.

Kun kojunkcio "se":

Se vi dezirus min viziti, mi estus feliĉa.

Se mi trinkus tiom da alkoholo, nun mi estus jam ebria.

Tempoj de la verbo

| | | |
|-----------|-------|---|
| preterito | /-is/ | Hieraŭ mi estis en teatro. Antaŭ unu horo mi legis. |
| prezenco | /-as/ | Hodiaŭ Jozefo skribas leteron. Nun mi legas libron. |
| futuro | /-os/ | Morgaŭ mi vizitos teatron. Post du horoj mi legos. |

Participoj aktivaj

| | | | |
|-----------|--------|--------------------------------|--------------------|
| preterito | /int/ | Skribinta homo estas skribinto | (tiu, kiu skribis) |
| prezenco | /-ant/ | Skribanta homo estas skribanto | (tiu, kiu skribas) |
| futuro | /-ont/ | Skribonta homo estas skribonto | (tiu, kiu skribos) |

Substantiva aktiva participo prefere indikas personon – se la teksto de la frazo ne temas pri io alia:

a/ Lernanto estas homo, kiu ion lernas (lingvon, muzikon ktp.)

b/ Hundo estas inteligenta besto – hundo estas bona lernanto.

Adjektiva aktiva participo estas egala kun normala adjektivo:

Bela fraŭlino, promenanta en la parko...

Flavaj folioj, falantaj de la arbo ...

Participoj pasivaj

| | | | |
|-----------|-------|---------------------------|------------------------|
| preterito | /-it/ | Batita knabo estas batito | (tiu, kiun oni batis) |
| prezenco | /-at/ | Batata knabo estas batato | (tiu, kiun oni batas) |
| futuro | /-ot/ | Batota knabo estas batoto | (tiu, kiun oni batos). |

Substantiva pasiva participo prefere indikas personon – se la teksto de la frazo ne temas pri io alia:

a/ Konato estas homo, kiun oni konas (konato, konatino)

b/ Hundo estas batata, ĉar ĝi ne obeis: la batato laŭte bojas.

Adjektiva pasiva participo estas kiel normala adjektivo:

Konata parolanto estas kuraĝa homo. Amata fraŭlino estas bela.

"JEAN KAJ MI" en Esperantujo

- jenajn vortojn mi legis sur koverto, kiun Eva Seemannová alportis kaj metis antaŭ min sur la tablon. Kaj malferminte la koverton mi fakte vagas kun Isabella Pellegrino tra Esperantujo. Por ke vi komprenu: Isabella Pellegrino estas la unusola persono de la teatraĵo far Andie Guelma "Jean kaj mi", kiun Eva Seemannová esperantigis kaj prezentas al la verda publiko ne nur en ĈSSR, sed ankaŭ translime.

Esperantistoj konas jam multajn jarojn tiun ĉi aktorinon, fondintinon de "Verda Ĉaro de Julio Baghy". Tiam, antaŭ multaj jaroj ŝi prezentiĝis al nia samideanaro kiel Maryša, Nora, Líza Doolittle kaj en multaj aliaj roloj. Nun la aktorino – artisme maturiĝinta – dediĉas sian arton al tiel nomata "malgranda sceneja formo". Ni vidis ŝin kiel Božena-n Němcová, prezentantan partojn el leteroj de tiu ĉi nacia verkistino, kiel lacan kaj pri sia infano batalantan patrinon en raportaĵo de E.E.Kisch. "La patrino de l'murdinto", ni aŭdis ŝin prezenti la plej karajn versojn de Halas, Seifert, Šrámek, Hora, Bezruč kaj aliaj, en brilaj tradukoj de Hromada, Kořínek, Pumpr, Lukáš – kaj ni vidis ŝin roli Isabella-n en la dramo "Jean kaj mi".

Eva mem diras pri tiu ĉi unupersona dramo, ke ĝi estas ŝia vivrolo. "Estas tia elrevita rolo, kiun aktoro renkontas nur unufoje dum sia vivo. Estas granda rolo – kompreneble – se unusola aktorino devas pli ol du horojn teni en atento, eĉ streĉo, sian publikon, certe jam tio postulas de ŝi absolutan koncentriĝon. Kaj krome – tiu rolo elĉerpas tutan aktoran registron: de vera tutkora amo kaj milda tenero, timo kaj ĵaluzo alternata de krudeco, teruro kaj vulgareco ĝis kolera malamo... ne mirige, ke mi post ĉiu prezentado estas absolute elĉerpita, ŝvitanta kaj tremanta kaj absolute ne konsciiĝas ion alian krom tiu teruriga abundo da sentoj, kiuj laŭvorte rulkovras min..."

Jes, ni vidis ja tiun prezentadon, ni vidis Isabellan plori, plendi, minaci kaj insulti. Cetere la esperantan migradon de Isabella en la teatraĵo "Jean kaj mi" akompanas leteroj de spektatoroj, parolantaj sufiĉe elokvente pri ties emocio.

Jen ekzemple kelkaj frazoj el kritiko de Jiří Kořínek pri la prezentado en Ústí n. L, en pasinta novembro:

"... Kvankam la interpretantino estis la fama esperantista dram-artistino Eva Seemannová el Prago, oni apenaŭ povis konjekti, kia ĝis nun nespertita unika travivaĵo prezentiĝos al la publiko. Oni simple estis konsternita, ke io simila estas ebla, la 129 minutoj de pura ludotempo, kiun dividis 15-minuta paŭzo, estis streĉa kaj profunde emocia, vere unika spektaklo, kie Eva Seemannová montriĝis kiel granda aktorino kaj mi aŭdacas aserti, ke la unusola, ĉi tion kapabla en la tutmonda Esperantujo..., oni ne sciis, kion pli admiri kaj aprezi, ĉu la lingve perfektan nuancoriĉan tradukon de la teatraĵo far E. Seemannová, ĉu ŝian belegan, klaran, sceneje modelan prononcadon, ĉu la trasantitan aktoran artprezenton aŭ fine enorman memorkapablon permesantan al la talentulino aktori pli ol du horojn sola sur la scenejo sen suflorado. Kaj kiel paroli, en kia Esperanto! Resume - artisma travivaĵo, kiun oni apenaŭ kredus ebla..."

Kaj aliaj du leteroj, ĉi foje el Brno, pri la sama teatraĵo:

S-ano J. Vondroušek, prezidanto de la E-klubo en Brno skribis: "Dankon por la bela vespero, kiun preparis al ni via granda arto! Estis grandioze, vi ĉiujn mirigis per la artprezento kaj laŭvorte kolosa memorkapablo. Ankaŭ via Esperanto estis brila, ĝin komprenis ĉiuj.

Jen venis al mi ideo, ke ĉiuj sinjorinoj kaj fraŭlinoj ĵetus sin al ni kaj kaj mortbatus nin. Estus ja iom domaĝe, ili mem poste bedaŭrus tion, sed jam malfrue!"

Kaj s-ano Old. Růžička (same el Brno) skribis: "La tempofluo de la dramo, mimiko, esprimoj de doloro kaj ĵaluzo kaj malamo estis prezentitaj kun eksterordinara arto, kiu verŝajne ne havas ekvivalenton kaj kiun mi iam povis vidi – mi estis tre kortuŝita..."

Sur la praga scenejo aperis "Jean kaj mi" dufoje, same en Havlíčkův Brod. Pri la prezentado en Prago mencias Eli Urbanová, fama esperanta poetino, en sia letero jenon: "... Denove mi gratulas al la hieraŭa vespero, via artprezento estis fakte kulmina... tiu seĝo estas fantastika rekvizito en manoj de artistino de via kvalito...kiam vi parolas en tiu mallumiĝo montrante nur profilon, ŝajnis al mi, ke vi fakte sidas en aŭtomobilo kaj travivas streĉon, kiu ĉiam pligrandiĝas.

Estas terura doloro, vane peni konvinki iun amatan, kiel mi vidas, mi multe pensas pri vi kaj

certe ne nur mi sola – estis por ni, esperantistoj, fakte emocia travivaĵo... "

Kaj jen kelkaj vortoj el letero de alia anino de la Praga klubo, s-anino M. Mráčková: la teatraĵo Jean kaj mi, kiun bonege esperantigis Eva Seemannová, estas sprita detektiva dramo por unu persono... La teatraĵo meritus esti prezentita ankaŭ eksterlande kaj mi estas konvinkita, ke ĉie ĝi havus grandiozan sukceson... Kvankam la teatraĵo daŭris pli ol du horojn, ĝi ne estis laciga, male – mi persone aŭskultus vin ĝis noktomezo...Elkoran dankon!"

Kompreneble ankaŭ la prezentadojn en Havlíčkův Brod sekvis leteroj kun laŭdaj kaj dankaj vortoj. Ekzemple s-ano Jar.Žák, prezidanto de la tiea E-klubo skribas: "...mi dankas ankaŭ en la nomo de niaj ravitaj spektatoroj por la fantastika travivaĵo, kiun vi al ni preparis kaj kiu en ni ankoraŭ ne finsonis. Mi aŭdis multajn entuziasmajn esprimojn, admirantajn vian arton kaj kapablon kontaktiĝi kun la spektatoroj dekomence kaj ne nur teni ilin en atento ĝis fino, sed tiun atenton ĉiam pli kaj pli streĉigi..."

Kaj la saman sukceson atingis Eva Seemannová en Berlino, kie ŝi prezentis sian Isabellon en junio. Dro Detlev Blanke tiam akcentis la "lingvan ĝuon", laŭdire: nur raran, kaj li tuj invitis nian aktorinon al Rostock, por prezenti tie en oktobro monologon far Anna Seghers "Ekskurso de mortaj knabinoj".

Je fino de nia interparolo mi demandis la aktorinon pri ŝia laboro venonta. "Ho, tiom da laboro atendas min, ke mi preskaŭ malesperas, ne kredante, ke mi ĉion sukcesos," ridas Eva. "La tempo estas tirano, ĝi senlace rapidas kaj igas ankaŭ nin rapidi. La homa vivo estas tro mallonga por ĉio bela, kion mi ankoraŭ dezirus fari – nu, mi laboros, dum mi estas kapabla. Vidu: la 6-an de oktobro mi forveturos al Mělník, kie mi prezentos "Goneril" de K. Čapek (en traduko de Jos.Vondroušek) kaj ion el leteroj de Božena Němcová. Post la reveno atendas min programo en Praga klubo, tuj poste mi forveturos al Rostock, la 20-an mi prezentos en Cheb "Jean kaj mi", de tie mi veturos al Havl. Brod, por fari tie unu el miaj ĉiumonataj vesperoj de poeziaĵoj (mi faras ilin tie jam la trian jaron, kaj ĉiumonate, imagu!) kaj ankoraŭ fine de la sama monato okazos granda vespero de monologoj en Brno. Por venonta februaro jam nun envicigis la E-klubo en Frýdek-Místek en sian programon la teatraĵon "Jean kaj mi" kaj ankaŭ Plzeň, kie mi ludis pasintsemajne, interesiĝas pri tiu ĉi teatraĵo. Kompreneble ankaŭ por la praga klubo mi volas daŭre ĉiumonate prepari ian programon, versojn, prozon aŭ teatraĵon, por Kristnasko mi ekzemple preparas unu el malnovaj popolaj kristnaskaj ludoj... Kaj krome, ĵus mi komencis gvidi la kurson por progresintoj."

Vere, ŝi ŝajnas esti nelacigebla!

Nu, ni deziras al ŝi, nia Eva, feliĉan, sukcesan kaj ankoraŭ longdaŭran vagadon tra Esperantujo! "Jean kaj mi" kaj ĉiuj venontaj Viaj prezentadoj fartu bone inter la verda popolo.

-Ondráček-

NI INFORMAS,

Vizito el Nov-Zelando. Dum kelktaga restado en Praha vizitis nian klubon la 25-an de julio gesamideanoj A d c o c k el Nov-Zelando. Far pli ol unuhora rakontado konatigis nin s-ano Adcock kun la historio kaj samtempe de sia patrujo, pri la vivo, la situacio de indiĝenoj, pri lingvaj problemoj tieaj ktp. Je fino de sia parolado nia gasto proksimigis al ni sian landon ankaŭ far lumbildoj, montrantaj al ni precipe la belan naturon de tiu por ni malproksima lando.

Atentu! Samideano Rudolf Burda el Plzeň, kiu en la kvindekaj jaroj eldonadis esperantan gazeton "Pacdefendanto", posedis fotoalbon. Ni petas ĉiujn klubojn, rondetojn kaj unuopulojn-esperantistojn, sendi al ni kian ajn informon pri tiu ĉi albo, aŭ informon, kie ĝi nun troviĝas. Ni urĝe bezonus ĝin pro E-historiaj kaŭzoj.

La informojn bonvolu sendi je adreso: Esperantista klubo en Praha,

111 21 Praha 1, pošt.schr.1069

En julia numero de oficiala soveta gazeto, destinita por eksteriando, MOSCOW NEWS, oni aperigis, kiel specialan suplementon en Esperanto, la Konstitucion (Bazan Leĝon) de Sovetunio.

-o-o-o-o-

La redakcio de BULTENO deziras al ĉiuj fidelaj legantoj agrablan Kristnaskon kaj en Novan jaron 1979 multe da sano kaj sukcesoj!

Estimataj gelegantoj!

"BULTENO" de nia klubo estas destinita por vi. Sed ankaŭ la enhavo de nia informilo estus deveninta parte de vi. Bedaŭrinde, la redakcia komisiono, ricevas de vi neniam kontribuajojn kaj en tia situacio estas ĝia laboro tre malfacila...

Ni scias, ke multaj el vi vizitadas ofte eksterlandon kaj la tieajn klubojn kaj renkontadas multajn alilandajn gesamideanojn.

Certe vi tiamaniere spertas ion, kion vi, far "Bulteno" povus transdoni al nia legantaro. En gazetoj kaj libroj, kiujn vi legas, oni ja trovas ankaŭ interesajojn, kiujn vi povus sciigi al aliaj viaj gesamideanoj! Kial do vi ne prenas paperon kaj skribilon, por priskribi tion per kelkaj linioj?

Dum la jaro 1978 vi regule ricevadis la dumonatajn programojn de la klubaj kunvenoj (krom du someraj monatoj). Tamen ni ĝis nun ne konas vian opinionon eĉ pri tiu malgranda informilo. Ankaŭ por la venonta jaro ni – laŭ decido de kluba komitato – planas dissendi al vi la informojn pri klubaj programoj. Samtempe ni tiun ĉi okazon uzados ankaŭ por koncizaj informoj.- Kaj nur, se la redakcia komisiono havos pli da kontribuajoj, estos la Bulteno eldonata en tiu ĉi formo. Kaj kiel ofte BULTENO aperos, tio dependas ankau de vi!

-Redakcia komisiono-

EK Praha provedl kontrolu placení členských příspěvků a bylo shledáno, že ještě ne všichni členové mají členské příspěvky pro rok 1978 zaplacený. A přece jsme již mnohokrát upozorňovali na našich klubovních schůzích i v Bultenu, že členské příspěvky (klubové i svazové) pro stávající rok se platí již koncem předcházejícího roku, a to oba příspěvky naší složenkou. To proto, že klub ze svazových příspěvků, pokud jsou odvedeny do konce roku, dostává rabat 10 %! Náš klub, kromě členského příspěvku, který činí ročně 20,-Kčs nemá prakticky žádný jiný příjem. A jeho režie není malá! Proto, až dostanete v listopadu složenky pro zaplacení příspěvků na rok 1979, neodkládejte je a zašlete nám obratem oba příspěvky. Děkujeme Vám !

-Kadlecová-

BULTENO de EKP (loka grupo de ĈEA) pk: 1069. Praha 1
redaktas: Kultura komisiono ĉe EKP-komitato